

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 50 fkoi

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

1981 - 3-4

KULTURAJ KAJEROJ

1981 MAJO-JUNIO-JULIO-AŬGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Islando, paradizo de la geologoj

Ĉar-kur-konkursoj kaj gladiatoroj S. Guillot

Natalia Davydovna A. Kuprin
trad. P. Polisĉuk

Poemoj de I. Minulescu Trad. C. Dominte

La Loire en la 17a jarcento La Fontaine
trad. B. Cheverry

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Verŝajne vi jam scias, kio okazos en la Esperanto-Domo dum la somero. La programo estis sufiĉe bone disvastigita. Sed ni povas doni kelkajn detalojn.

Kio estos farita dum la unua periodo ? Kiel kutime la ĉeestantoj povos aŭskulti prelegojn. Kiujn ? Ni ne donos la titolojn. Sed sciu, ke oni parolos pri la originoj de Eŭropo, pri folkloro, pri la malnova kataluna literaturo, pri la Kanariaj Insuloj, pri Irano, pri la insulo Kapreo, pri... pri... aliaj temoj interesaj prezentitaj de samideanoj, kies nomoj estas jam konataj aŭ tute ne, de la kutimaj vizitantoj de Gresillon, Rollinger, Cheverry, Boyet, Stiling, Carbonell, Doye, Müller, ktp... Dum la sama periodo Ivo Durwael gvidos kurson. Kiunivelan ? Tio dependos de la bezonoj de la lernemuloj, ĉar, ankaŭ ĉifoje ni denove nur surloke konos tiujn bezonojn.

La kursoj de la dua periodo estos tri nivelaj. La komencantoj povos agrable lerni kun S-ino Audrey Childs-Mee aŭ pli bone iri siajn unuajn paŝojn sur la verda vojo al kono per praktiko. S-ro Lloancy faciligos, por tiuj kiuj ne havis la okazon parole praktiki la lingvon sufiĉe, la transiron de teoriaj konoj al vivanta ekzercado, kaj donos al ili kaj aliaj la eblecon riĉigi sian vort-kaj strukturtrezoro. S-ro Boyet helpos diversmaniere la jam progresintajn homojn, kiuj deziras pli profundigi siajn konojn pri kaj per la lingvo kaj plidiversigi sian esprimadon.

Tria periodo, kiu ofte por kelkaj daŭras bedaŭrinde nur du semajnojn, kia vi estos ? Dum unu semajno okazos la Seminario pri Rektmetoda Instruado de Esperanto gvidota de Audrey C.E. Childs-Mee. Temos ĉefe pri la apliko de tiu metodo helpe de la Baza Kurso de Esperanto. La seminarianoj studos kaj poste aktive uzos la materialon. Ili povos eĉ ricevi atestilon post preparo kaj prezentado de provleciono. Samtempe kaj poste okazos kursoj. S-ro Lawrence Mee rektmetode gvidos la komencantojn kun sia kutima bonhumoro. S-ro Parisot, jam instruinta plurajn somerojn en Gresillon, praktikigos la lernantojn de la meza kurso kaj S-ino Vincent (ĉu necesas prezentado ?) respondos al la bezonoj de la spertuloj.

Dum la tri periodoj estos proponitaj komunaj ekskursoj kaj kelkaj artaj manlaboroj kaj la foto-laboratorio estos disponebla en ĉeesto de la respondulo.

Eble nenio nova, sed tamen io alloga por ĉiu. Restas kelkaj litoj por la dua aŭ tria periodo.

Esperanto tra la Mondo

Nova « satelita » oficejo de U.E.A.

Universala Esperanto-Asocio, kies ĉefa sidejo estas en Roterdamo, jam kreis centron en Antverpeno (1976) kaj oficejon en Nov-Jorko (1979), notinde por la rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj.

La 1an de Aprilo, ekfunkciis krome nova centro de U.E.A. en Budapeŝto por, speciale, eldona kaj scienckteknika agadoj, en akordo kun Hungara Esperanto-Asocio.

Esperanto kaj turismo :

Okaze de la inaŭguro de la budapeŝta centro de U.E.A., la prezidanto, S-ro G. Maertens havis okazon renkontiĝi kun, interalie, la ministro pri enlanda komerco, S-ro Vilmos Saghy kaj gratuli lin pro la hungara iniciato, favore al Esperanto, en la Monda Turisma Konferenco en Manilo.

Estas notinde ke la hungara fremdultrafika oficejo jam eldonis grandkvante « Baza Esperanto-konversacio » kaj ke oni intencas estonte aperigi ĉiujn bazajn hungarajn prospektojn ankaŭ en Esperanto.

Ni memorigas ke ekzistas faka esperanto-asocio pri turismo. Temas pri « Monda turismo ». Sidejo por okcidentaj landoj : Troststrasse 27/2, Vieno, Aŭstrio, A-1100.

Renkonto en Germanio :

Dank'al subvencio de German-Franca Junulara Fonduso, dulanda esperanto- semajno okazos en Dümmerlohausen, Germanujo (10a — 16a de Aŭgusto).

Temo : « Tradicia kaj alternativa komunikado en Francujo kaj F.R. Germanujo ».

Vizitoj, ekskurso. Informas : V. Felhölter, Hiarm-Grupe — Str 23, D-4500 Osnabrück.

Bela turisma broŝuro :

Aperis bela kolora broŝuro turisma : « Koran bonvenon al Malmö ! ». Petu ĝin kvantete menciante ke vi deziras la esperantlingvan eldonaĵon. Adreso : Malmö turistbyra, Hamngatan 1, 21122 Malmö, Svedujo.

Decido pri la kongreso... 1984 !

La estraro de U.E.A. jam decidis ke la 69a universala kongreso de Esperanto okazos en 1984 en Vankuvero (Kanado).

Oni scias ke la urbo Antverpeno estis elektita por la kongreso 1982.

Inter la fakaj asocioj : pri ŝako

Esperanto ŝak-ligo Internacia proponas al siaj membroj ne nur turniroi dum la kongresoj sed ankaŭ perkorespondan ŝakludadon.

Adreso de la prezidanto : D-ro Josef Nemeth, Szabo J.U. 3 Sz. em, H-6300 Kalocsa, Hungario.

Pri Goo :

Estis fondita en 1979, Esperantista Go-Ligo Internacia (E.G.L.I.). Ĝi kunvenas regule por batali goe en Tokio, la duan merkredon de la monato.

Adreso de la peranto por okcidenta Eŭropo : Attilio Zambon, Via Nani 18, I-30126 Lido Venezia ; Italio.

Ĝenerala sekretario : M. Emori, 2-26-2 Kozima, Tyofu, Tokio 182, Japanio.

Novaj libroj :

— « L'omnibuso kun tri pasaĝeroj », originala kaj tradukita, proza kaj poezia libreto de japanoj.

— Reeldono (en Hungario) de la libro de Lienhardt : « Amuzaj dialogoj en Esperanto », kies unua eldono ricevis ŝatatan akcepton de la novaj esperantistoj.

— En lia serio « Tra la parko de la franca poezio » kaj post « La renesanca epoko », Prof. Waringhien aperigis en dulingva teksto, kun enkondukoj kaj notoj, tradukojn sub la titolo : « La klasika periodo ».

— « Kiel verki kaj traduki poemojn : du studoj ». Verkita de K. Kalocsaj (27 paĝoj).

— « Lidja Zamenhof, vivo kaj agado ». J. Dratwer, en 112 paĝoj, kunigis ĉefe leterojn de la filino de Zamenhof.

Inter la lingvistoj :

— La 31an de Marto okazis en Paderborn (Germanujo), kolokvo kun la kadra temo : « Kio vere estas la interlingvistiko ? ». Partoprenis 17 fakuloj inter kiuj D-ro Szerdahelyi, el Budapeŝto, kaj D-ro Helmar Frank.


— Dum Majo kaj Junio, La Instituto por Edukaj Sciencoj en la universitato de Santiago (Hispanio) okazigis 50-horan seminarion pri esperantologio kaj interlingvistiko. Ĝi estis destinita ĉefe al la universitataj instruistoj.

En Kubo :

Fondita antaŭ du jaroj, Kuba Esperanto-Asocio nombras ĉirkaŭ 1400 membrojn. Tra la lando okazas amasaj Esperanto-kursoj por pluraj centoj da homoj. Post la kursoj, oni fondas lokajn Esperanto-klubojn.

Islando, paradizo de la geologoj

Antaŭ 2 Milionoj da jaroj, en terciaro, Islando naskiĝis samtempe kun Alpoj, Himalajo kaj Kordileroj. La eliĝadon de tiuj montoj akompanis nenombreblaj lafo-fluegoj, kiuj demetis bazaltajn terojn sur Islando, Groenlando, Feroaj Insuloj, sur okcidenta Skotlando kaj norda Irlando. Vulkanaj erupcioj kaj tertremoj skuis kaj renversis tiujn bazaltajn tavolojn, origine horizontalajn. La stratumiĝo de tiuj bazaltoj — (dikaj je 1.700 m, eĉ kelkfoje je 4.800 m) nete aperas en la orienta kaj nordokcidenta Islando. Tie ĉi la geologoj malkovras la vulkanajn kaj tektonikajn movojn, la klimatajn kaj biologiajn kondiĉojn dum la diversaj geologiaj eraoj : la fosiliajn moluskojn, la tavolojn de lignito naskiĝinta el la antikvaj arbaroj karbigitaj de la bazaltaj torentoj.



Kaj ankaŭ, ke Islando situas ekstreme de la Atlantika mediana « Dorsalo », de vulkana origino.

Inter la vulkanaj insuloj, Islando estas la plej granda ; ĝi estas unu el la 25 « Varmaj Punktoj » de nia globo. Hodiaŭ unu triono de ĝia grundo troviĝas en aktiva vulkana zono. Torentoj kaj tavoloj da solidiĝintaj lafoj kovras unu dekonon de tiu lando ; lafoj grizaj aŭ brunaj ; kelkaj nigraj kaj vitrecaj, kies rapida solidiĝo donis la obsidianon kun akraj eĝoj. De post la lasta glacia epoko (ĉirkaŭ 15.000 jarojn ant. K.) 150, eĉ 200 vulkanoj montriĝis aktivaj — 30 de post la kolonIado en la 9-a jarcento. Dum la lasta duonjarmilo, unu triono de la lafo kraĉita de nia planedo demetiĝis sur Islandon. Sur la malnovaj lafoj kreskis nur musko kaj likeno.

La montoj, la vulkanoj, la glaciejoj superstaras ŝtonajn, sablajn, cindrajn dezertojn kaj ŝajne senfinajn lafo-kampojn : sine de tiu lafo : grotoj kaj kavernoj.

En zono larĝa je 100-200 km, sub la tera krusto, dika kelkfoje je nur 10 km, en la profundaĵoj de la tera mantelo, la vulkanaj fortoj dormetas aŭ ekscitiĝas.

Islando proponas al la vulkanologoj la plej diversajn terajn vulkanojn : la ŝildvulkanoj platigitaj kaj kovritaj je bazaltaj tavoloj lante amasigitaj ; la konusaj vulkanoj estas la plej multaj : ili havas konusan krateron kaj konus-formajn skorio-amasojn. Pacemaj kaj sendanĝeraj ŝajnas la vastegaj glacio-kovriloj, kiuj kovras la centron de Islando. Tamen la ĉi-tieaj subglaciaj vulkanoj estas la plej danĝeraj. La Vatnajökull etendiĝas sur vulkana zono forte eksplodema (50 erupcioj de la 9-a jarcento). Tiuj erupcioj okazigas subitajn glacio-fandiĝojn. La fando-akvo, potence torentas kaj ĉion detruas.

La Snaefellsjökull (1.466 m) tute trankvilas de ĉirkaŭ 2.000 jaroj ; ĝi estas tiu, kiun Jules Verne uzis por sia Vojaĝo al la Centro de la Tero. La Dyngjufjöll-montaro (1.510 m) entenas la vastan krateron Askja, 8-m-diametra, perfekta kopio de la luna surfaco ; ĝi servis por la trejnado de la NASA-astronaŭtoj.

Teruraj erupcioj markis la Islandan Historion.

ESTIS EN JUNIO DE LA JARO MIL

De 70 jaroj, ĉiujare en junio, kiam la tagoj ne plu havas nokton, Althing kunvenas en Thingvellir ; la ĉi-taga demando estas grava : « ĉu Kristanismo anstataŭos Paganismon ? religia civita milito minacas la junan respublikon.

« Sed, je tiu momento, rakontas antikva teksto, kuranta viro alvenas ; li anoncas, ke vulkana erupcio okazas en Olfuss kaj minacas la farmon de la Grand-Pontifiko Thoroddur. La paganoj krias, ke estas la dioj, kiuj koleras kontraŭ la kristanoj.

« Sed, respondas la Grand-Pontifiko, kiuj dioj koleris, kiam ŝprucis la lafoj, sur kiuj hodiaŭ ni sidas ? La ĉeestantoj bone scias, ke, tiam, sur la insulo, estis nek paganoj, nek kristanoj. Je la fino de tiu sesio, Islando akceptis Kristanismon ».

La erupcio de Julio 1783 estis la plej granda katastrofo de Islando. La sceno okazas en Kirkjubaejarklaustur, malnova bieno, situa sude de Islando. La preĝejo kun malalta tegmento estas tute ruinigita. La diservon de tiu ĉi tago oni nomas en la islanda historio : la Fajro-Meso.

La 8-an de julio, fendo longa je 12 km estis malfermiĝinta en la altaj paŝtejoj, kuŝaj sudokcidente de la glaciejo Vatnajökull. De 40 tagoj, de 40 noktoj, lafo-torentegoj fluegas kun eksterordinara rapideco el supre de la montetoj kaj ŝutiĝas sur la malaltajn terojn, cindrigas homojn, bestojn, preĝejojn kaj domojn. Kiam la erupcio ĉesas, 6 monatojn pli poste, la lafo kovras 565 km 2. Je la fino de la sekvanta jaro, 75 % de la brutaro estas pereintaj, aŭ sub la lafoj, aŭ pro manko de vegetalaro, aŭ pro la fluoro kaj la aliaj poluciaĵoj, kiuj ilin venenigis (28 000 ĉevaloj, 11 461 bovidoj, kaj 190 488 ŝafoj) ; 10 000 personoj el la 30-40 000 loĝantoj mortis pro malsato aŭ pro la malsanoj ŝulditaj al la erupcio.

Hekla (la ĉapo) estas la plej fama el la islandaj vulkanoj ; ĝi nombras 100 erupciojn dum sia 7-8.000-jara ekzistado ; 15 okazis dum la historia periodo. En la Jaro Mil, la valo Thjórsârdalur sude de Islando, ŝirmis prosperan agrokulturan komunumon. Sed, en 1104, Hekla ruinigis la regionon ; Mezepoko vidis en ĝi la Pordojn de Infero. De 1845 Hekla dormetis. Sed, en 1947 ĝi prezentis senĉesan fajro-spektaklon dum 13 monatoj ; la vento portis la cindrojn ĝis Finlando. La 2-an de majo 1970, oni estis inaŭguranta la Elektran Centralon de Bürfell (220 000 kiloŭatoj) ; ĉirkaŭ la Centralo, por eviti la sablon, oni estis kreskiginta herbon. Dum la inaŭgurado, la prezidento kaj la aliaj oratoroj elvokis la antaŭan blankan dezerton, kiu estis ricevinta la verdajn kolorojn de la vivo. 3 tagojn pli poste, pluvo de skorioj kaj cindroj falegis sur la tegmenton de la Centralo -sed ne detruis ĝin. 2-horojn poste, kiam la cindro-pluvo ĉesis, estis denove dezerto, ĉifoje dezerto nigra.

Heimaey estas la ĉefa el la Insuloj Westmann. La 14-an de novembro 1963, 20-km sude de Heimaey, la fiŝistoj vidis ŝpruci el la maro nigraj nuboj, fulmoj, bomboj, cindroj ; la sekvantan nokton, insulo aperis ; oni nomi ĝin Surtsey, la insulo de Surtur, la subtera dio de la Fajro kaj de la Tondro. La vulkano ŝutis lafojn dum 3 jaroj kaj 7 monatoj.

Heimaey estas la plej granda fiŝhaveno de Islando. En la 23-a de januaro 1973, fendo longa je 1 800-m ŝiras la orientan flankon de la vulkano Helgafell. El 40 fajro-kolonoj ŝprucas lafo-torentoj, kiuj, defalante de la klifoj, direktiĝas al la maro. La loĝantoj estas indulgitaj sed parto de la urbo estas detruita : en 5 monatoj, lafo-fontanoj altaj je 300 metroj, kovras la domojn per skorioj-monteto 250-metra. La fiŝhaveno estas minacata ; sed ĉi tie, la Islandanoj sukcesis la neeblon : per kontraŭ-incendiaj tuboj, per akvopumpiloj, ili haltigas kaj senmovigas la lafo-fluon sur la kajo de la haveno. Dume la insulo plilarĝiĝis je sia triono.

Hodiaŭ la vulkano Eldfell proponas al la turistoj sian krateron, el kiu leviĝas vapor-nuboj fetorantaj sulfuron ; eksterordinaran vidpunkton sur la nigraj lafo-kampoj, sur Heimaey duone englutita, sur ĝia haveno netuŝita, sur la rokoj, kie nestas multaj birdoj, kaj pli malproksime sur la apudaj insuloj, sur Surtsej, sur Islando.

DE 50 JAROJ LA MALANTAŬENADO DE LA GLACIEJOJ

La poetoj prikantis la belecon de la Islandaj Glaciejoj, kies suproj enkapuĉigitaj de neĝo reliefiĝas sur la blua ĉielo. Ili kovras unu naŭonon de la insulo. Ili estas la plej grandaj de Eŭropo : vastaj kupoloj, kiuj staras je pli ol 1.500m. ; la Hofjökull estas 1 765 metra. La plej granda, la Vatnajökull (8 500km 2) egalvaloras la tuton de la skandinaviaj kaj alpaj glaciejoj. La cindroj sorbitaj de la glacioj, la suno, la luno, la nuboj, la vento, la ombroj ilin kolorigas je bluo, verdo, rozo, flavo kaj oranĝo ; sed kiam glaciejo kaj ĉielo miksiĝas regas mondo sen ombroj, sen kontrastoj, la absoluta blanko.

La koloniantoj venintaj el Norvegujo kutimis je la norvegujaj glaciejoj ; ne timante, ili instaliĝis piede de la islandaj glaciejoj ; ankoraŭ nun, por iri de unu farmo al alia, la vojoj ilin laŭlongas aŭ ilin transpaŝas.

Ili formiĝis pro kunpremo de la vintra neĝo. Pro sia pezo, la glaciejoj malrapide antaŭeniras ĝis la valoj pli varmaj kaj naskas akvo-fluojn. Kiam vintro kaj somero estas rigoraj la glacia lango antaŭeniras en la malaltajn terojn. Malfortaj neĝofaloj kaj varmaj someroj malantaŭenigas la glaciejojn. Jen tio, kio okazas de 40-50 jaroj. Tiu malantaŭeniĝado modifas la pejzaĝon ; sur la malaltaj teroj la glacio malaperas kaj lasas dikan kaĉon sur frostigita sub-grundo ; tio malhelpas la enfiltriĝon de la akvoj. Sed, eĉ sur tiu glaciigita subgrundo, la vegetalaro enplantiĝas kun ekstrema rapideco.

LA FLUANTAJ AKVOJ

La akvoj, kiuj eliĝas el la glaciejoj estas opakaj kaj malklaraj ; ili formas torentojn furiozajn kaj malvarmegajn ; la riveroj, senĉese kunportas rokpecojn, teramasojn, kiuj formas sablajn vastaĵojn kaj la deltojn de sud-Islando. En somero, la torenta Jokülsâ Fjollum povas demeti en la maron 120.000 tunojn da defalaĵoj. La akvofluoj eliĝintaj el Vatnajökull senĉese ŝanĝiĝas je direkto kaj lito. Nur la spertaj kondukistoj de aŭtoĉaroj, ĵipoj kaj landrover-oj scias trovi la travadejojn kaj akceptas ilin transpasi.

Tute aliaj estas la fonto-akvoj ; ĉar filtritaj de la lafoj, kiujn ili trairas, ili estas travideblaj.

Ili formas rojojn, riverojn, kaskadojn : tiuj ĉi estas multaj, abundaj, eksterordinare belaj : Gullfoss, Skôgafoss, Godafoss, Ofaerufossar kaj super ĉio la Dettifoss, norde de la lago Myvatn.

LA LAGOJ

Althing sieĝas apud la lago Thingvallavatn (82 km2) profunda je 114 metroj ; en ĝia klara akvo naĝas la truitoj, speguliĝas la erikejoj florriĉaj ; kaj la montoj, blankaj en vintro, vastpaletaj en aŭtuno. Tiu regiono iĝis la Nacia Parko.

Thôrisvatn (70 km2) okcidente de la glaciejo Vatnajökull estas tute male senigita je ĉia organika vivo. Estas prejzaĝo de malhelaj montoj ĉirkaŭ griz-nigraj cindro-kampoj.

Myvatn (38 km2) « la lago de la muŝetoj » sur lafo-fundo estas profunda je nur 2 -4 metroj. Estas paradizo por faŭno kaj flaŭro. Nenie, tiel proksime de poluso, oni trovas regionon tiel riĉan je plantoj kaj bestoj ; ĉirkaŭ la lago kreskas muskoj, graminacoj, erikoj, herboj, betuloj. Multego da akvaj birdoj, inter kiuj de 40 000 ĝis 50 000 anasoj kolonias la lag-insuletojn la duoninsulojn kaj la golfetojn.

Multaj turistoj ĉi tie tendumas por fiŝi truitojn aŭ ekskursi : viziti la Dimmuborgir, la Nigrajn Kastelojn, kies lafaj labirintoj estas 2 000 jaraj ; sin bani en la subteraj grotoj de Stôragjâ kaj de Grotagja ; miri antaŭ la sulfurejoj kaj la varmaj fontoj de Nâmaskarq ; grimpi laŭ la Hverfjall (la monto de la Kratero).

Ĉirkaŭ la lago, la lafoj fluis sur marĉa grundo ; la akvo de la fundo vaporiĝis kaj suprenpuŝis « vezikojn » de lafo ankoraŭ ne solidiĝinta. Tiuj vezikoj malaltaj (ĝis 30 metroj) ŝajnigas luna la pejzaĝon.

LA VARMAJ FONTOJ

Islando nombras multege da varmaj fontoj. La neĝoj donas abundajn akvojn ; tiu akvo enfiltriĝas ĝis la varmaj regionoj de la subgrundo kaj riĉiĝas je mineraloj ; tie ĉi la akvoj varmiĝas ĝis bol-punkto kaj plie. Tra fendetoj, koridoroj, kavernoj, fendegoj eskapas tiuj varmaj akvoj. Ekzistas proksimume 250 termofontaj regionoj kun temperaturoj diritaj « malaltaj » (je bolpunkto). La unuaj koloniantoj jam uzis tiujn varmajn fontojn. Hodiaŭ la farmoj ilin uzas por banoj, lavadoj, hejtado.

Jam en 1928 boradoj ĉirkaŭ Rejkjavik liveris posekunde 14 litrojn da akvo 87-grada ; tubaro 3-kilometra alportis tiun akvon al 70 domoj, du naĝejoj kaj unu lernejon. En 35 jaroj, la kamparo ĉirkaŭ la ĉefurbo liveris senhalte 300 milionojn da kub-metroj da varma akvo kun konstanta temperaturo.

De 1958 la lastaj boradoj, en tiu regiono, profundaj je 700 ĝis 2.200 metroj, donas po-sekunde 300 litrojn da akvo 128-grada. De 1969 oni povas hejti 8 700 domegojn, 72 000 loĝantojn. Aliaj urboj kaj vilaĝoj, termofonta hospitalo por 140 personoj uzas varmajn akvojn.

GEJSEROJ

2 gejseroj troviĝas en la regiono de Rejkjavik : Gejsero kaj Strokkur ; oni pensas, ke ili formiĝis en 1294, okaze de tertremo. La baseno de Gejsero estas 18-m-larĝa kaj 1,30 m-profunda ; la ŝenalo, kiu estas 3 m-larĝa je sia faŭko, vertikale enprofundiĝas kaj mallarĝiĝas ; antaŭ kelkaj jaroj ĝia akvo-kolono atingis 40-60 metrojn dum 10 minutoj ; hodiaŭ ĝi estas malpli agema. Strokkur estas pli spektinda : subtera muĝado anoncas, ke la akvo komencas boli ; la baseno kovriĝas je akva kloŝo, el kiu ŝprucas kolono de akvo kaj vaporo ; la fenomeno ripetiĝas ĉiun 3-5 minutan intertempon.

ALT-TEMPERATURAJ AKVO-FONTOJ

La Islanda Centro estas riĉa je fontoj kun tre altaj temperaturoj : la vaporo, kiu eliĝas el la sulfurejoj atingas 230°.

Tie ĉi staras montara regiono, la Kverkfjöll (gorĝo) el vulkana origino : 1920 metroj por la plej alta supro. Norde cindraj kaj lafaj platformoj, sude la vasta glacia kupolo igas ĝin nealirebla. Vastega faŭko ĝin du-disigas.

Tie ĉi estas la termofonta zono la plej miriga el tuta Islando. Vaporoj 230-gradaj malkomponas la « riolitikan » grundon en gipso-ŝtonojn, sulfatojn, argilojn flavajn aŭ ruĝajn kaj ĝin kovras per flava sulfura krusto.

Ĉie bolas, gluglas, fajfas. Abundas bolantaj fontoj, kotaj lagetoj, kie gargarbruas plumba kaĉo, « marmitoj de sorĉistinoj » en kiuj eksplodas kotaj kupoloj, enormaj vapor — ŝprucaĵoj, kiuj krevigas la nevaĵon, 1 600 metrojn super la maro.

Nenie en Islando, la kontrasto inter Fajro kaj Glacio estas tiel potenca, kiel ĉi tie.

ĈAR-KUR KONKURSOJ KAJ GLADIATOROJ

Romo famiĝis pro siaj Ludoj. Oni memoras ĝiajn amfiteatrojn kaj ĝiajn cirkojn. Tamen longaj jarcentoj pasis antaŭ ol oni decidis starigi specialajn konstruaĵojn dediĉitajn nur al spektakloj ; ĝis tiam la valo de Murcia inter Palatin kaj Aventin, plej konvenis por defilado, procesio, ĉevalkurado ; longa je 600 metroj, larĝa je 150 m., ĝi estis trairita en sia mezo de rojo, kiu pli poste iĝos la « Spino ». Nur rudimentaj arangoj permesis desegni dromon kaj sidigi la spektantojn ; pli poste oni konstruis la loĝiojn el kiuj ekiris la konkurantaj ĉaroj ; oni starigis muron ĉirkaŭ la areno por protekti la rigardantojn ; oni ornamis la « spinon » per statuoj ; ĉe ĝia ekstremaĵo oni metis limŝtonojn, sur kiuj ovoj indikis la nombron de la ĉirkaŭiroj efektivigitaj.

En 221 antaŭ Kristo Flaminius Nepos komencis konstruon de dua cirko (ni rimarku, ke la Vatikan-cirko, kie mortis la kristanoj, estis propra kurejo, kiun Caligula instalis en siaj ĝardenoj ; ĝi estis parte detruita en la IV-a jarcento pro la konstruo de baziliko S. Petro).

29 jarojn antaŭ Kristo Statilius konstruigis la unuan ŝtonan amfiteatron, kiun incendio detruis. Nerono rekonstruigis ĝin el ligno kaj Vespasien decidis konstruadon de ŝtona amfiteatro : estas la Coliseum (Kolizeo). Titus ĝin inaŭguris dum 100 festo-tagoj : 100 Ludo-tagoj : ĉasoj, luktoj inter homoj kaj bestoj, maraj bataloj, kur-konkuradoj, dueloj inter gladiatoroj. Por montri sian malavarecon Titus disdonis, de tempo al tempo, biletojn sur kiuj estis skribita la nomo de donaco : kaj la donacito ricevis sklavon aŭ riĉajn vestojn aŭ arĝentaĵojn.

La areno (80 m. × 54) estis ĉirkaŭita de palisaro. La sidŝtuparoj staris 4 metrojn super la areno. Koridoro laŭiris la arenon. Kiam tro sunis oni etendis pere de stangoj kaj super tiu grandega areno velojn el lino ; speciala korpuso de ŝipistoj estis dungita por manovri tiujn velojn ; tio ĉi estis tute ne facila, kiam forte ventis. La areno estis larĝa planko starigita sur volboj altaj je 5-6 metroj. Sube estis la kulisoj, kie oni ordigis la spektaklojn ; ĉi tie estis klappordoj, ŝarĝoliftoj, kloakoj, kaĝoj kaj fosaĵoj por la sovaĝaj bestoj, kiuj ĉi tie loĝis. La planko de la areno estis sufiĉe likimuna por ke oni povu ĝin transformi en basenon, kie manovris militŝipoj dum bataloj ŝipaj.

BEN-HUR TIA, KIA ĜI ESTIS


Ĉiu ĉaro montris apartan koloron : Blanko, Bluo, Verdo, Ruĝo. Ĉiu koloro simbolis politikan partion : ĉiu partio havis siajn subtenantojn, kiuj aplaŭdis ne la koĉeron sed la sukceson de la koloro elektita. Neron, Caligula favoris la « Verdulojn » ; la Senato, la Aristokrataro, la imperiestro Vitellius subtenis la « Bluulojn ». Sub la ŝajnoj de sporta batalo, interesoj pli gravaj montriĝis. Plue, ĉu la dioj ne intervenis en la rezultatoj ?

La ĉaro estis simpla kesto muntita sur radoj kiel la praaj milit-ĉaroj ; ĝi estis tre leĝera kaj nur la pezo de la koĉero alportis al ĝi iom da stabileco ; la plej malgranda kolizio povis esti fatala.

Ĉe la momento de la ekiro, la konkurantoj atendis en la loĝioj fermitaj de bariero. Magistrato skuis blankan ŝtofon, la barieroj falis, la jungaĵoj ekiris. Ili ĉirkaŭiris 7 fojojn la arenon : estis 7 kilometroj kaj duono ; je ĉiu ĉirkaŭiro, oni forprenis unu el la ovoj alkroĉitaj al la « spino ». Povis okazi ke pro la granda rapideco la ĉaro renversiĝis, la radoj rompiĝis, la jungiloj interplektiĝis dum la viro provis, plej rapide kiel eble, ilin tranĉi per sia trancilo, kiu estis fiksita ĉe lia zono. Se li ne sukcesis, lia korpo estis trenita de la ĉevaloj kaj resaltis sur la dromo, sur la spino aŭ sur la eksteraj barieroj ; ĝenerale la aliaj jungaĵoj koliziis kun la akcidentita ĉaro kaj viroj kaj bestoj pereis.

GLADIATOROJ

Estas okaze de la funebroj de Junius Brutus (264 ant. K.) ke oni prezentis la unuajn gladiatorojn (3 parojn).



Tiu ceremonio anstataŭis la homajn buĉoferojn, kiuj, ĝis tiam, akompanis la morton de eminentaj personoj. 50 jarojn pli poste, ĉe la funebroj de Emilius Lapidus 22 paroj partoprenis la Ludojn. Estas nur unu jarcenton kaj duonon pli poste, ke oni akceptis oficiale la gladiatorojn ĉe la publikaj Ludoj. Malgraŭ la opozicio de la aristokrataro, la Magistrato, kiu organizis la Ludojn, prezentis, por kontentigi la publikon, unu centon da gladiatoroj, kiuj luktis ĝis morto. La riĉaj eminentuloj havis sian propran trupon, kiun ili loĝigis kaj trejnis sur siaj bienoj. en kazernoj, malproksime de la urbo. Ĉar tiuj trupoj fariĝis danĝeraj bandoj en la manoj de potencaj mastroj oni limigis la nombron de gladiatoroj por ĉiu posedanto. En la kazernoj la disciplino estis terura ; la gladiatoro ĵuris ĝin akcepti kaj lia mastro rajtis lin bati, vundi, bruligi, mortigi.

Kompense li ricevis, sub la kontrolo de medicinistoj, riĉan nutraĵon, banojn, masaĝojn. En la antaŭa tago de la batalo li partoprenis, plenaere, grandan festenon. Multaj sciemuloj venis por admiri kaj taksi la morgaŭajn batalantojn.

Milit-kaptitoj el diversaj landoj, kun siaj propraj militistaj kutimoj, devis lukti en la areno ; multaj bretonoj kaj judoj tiamaniere mortis. La kondamnitoj je morto, preskaŭ sen armiloj devis batali kontraŭ bone armitaj gladiatoroj ; la sklavoj, kaj la ne-romianoj, troviĝis vid-al-vide al sovaĝaj bestoj. Tamen la plej junaj kaj plej fortaj ricevis ŝancon : oni akceptis ilin en la kazernoj ; post 3 jaroj de bataloj — se ili ankoraŭ vivis — ili ricevis liberecon.

Tamen la popolo preferis sportajn luktojn inter gladiatoroj egale trejnitaj. Iom post iom oni konsideris ilin kiel atletojn, Ili estis kuraĝaj kaj ne timis la morton ; ilia rolo estis morti aŭ mortigi. Baldaŭ esti gladiatoro estis honoro kaj kelkaj riĉaj junuloj deziris lukti en la areno. La lukto prenis diversajn formojn.

Kelkaj batalantoj havis nur kaskon kun viziero, ŝildon kaj spadon. Oni nomis ilin « postkurantoj » ; oni admiris ilian lertecon por ataki kaj malproksimiĝi. Aliaj batalantoj rapidaj estis la ret-armitoj ; ili havis reton plumbitan, similan je tiu de la fiŝistoj kaj forkon kun tri dentoj (kelkfoje plu) kiel tiu de la tinuso-fiŝistoj ; preskaŭ nudaj, ili havis nur mallongan tunikon, larĝan zonon el ledo kaj brakbendon por protekti la maldekstran brakon.

Pli peze armitaj estis la Mirmillonoj, la Samnitoj, la Galloj, la Tracoj, kiujn venkis la Romaj armeoj laŭlonge de siaj militiroj. Ĉiuj portis kaskon, kirason, ŝildon, glavon kaj ponardon, kies formoj variis laŭ la gento. Kelkaj estis tute kovritaj je fero kiel la kavaliroj de Mezepoko. Por ilin venki necesis ilin renversi kaj ilin ponardi tra fendo de la kiraso aŭ tra la aperturoj aranĝitaj por la okuloj.

El siaj militiroj en Bretonio, Claude, Neron kaj Domitien raportis la « essedari-ojn ». Ili estis gladiatoroj, kiuj batalis sur ĉaroj tirataj de ĉevaloj. Cezaro prezentis ilin al la Romanoj.

La « essedari-oj » estis plej lertaj por, en plena galopo, salti sur la dorson de ĉevalo, stariĝi sur la timono de la ĉaro aŭ firme reteni la jungaĵojn sur la fortaj deklivoj. Tiu mirinda spektaklo estis kelfoje akompanata de orgenomuziko.

La gladiatoroj « laquearii » kiel vakeroj uzis lazon, kiun ili forĵetis de malproksime sur la kontraŭulon, kiun ili ĵetis teren zoninte liajn brakojn aŭ gambojn.

Por ankoraŭ pli mirigi la publikon, Cezaro prezentis veran ŝipan batalon. Okaze de sia triumfo (46 ant. K.) la venkinta diktatoro fosigis, en kampo de Marso artefaritan lagon, kie alfrontiĝis du flotoj nomitaj la « Tirena » kaj la « Egipta ». La ŝipoj estis veraj militŝipoj movi-

gitaj de remistoj kaj sur kiuj soldatoj furioze batalis !

Saman spektaklon organizis Aŭgusto (2 jarojn ant. K.). Li fosigis la ŝipturnirejon de Transtevere kaj konstruigis specialan akvodukton por alkonduki la bezonatan akvon. Ĉi-foje la flotoj estis « Persa » kaj « Atena » ; estis preskaŭ restarigo de la Salamine-batalo. Claude ankaŭ ordigis sur la lago Fucin (antaŭ ĝia elsekigo) ŝipan batalon je kiu manovris 19 000 soldatoj.

BESTO-MORTIGANTOJ

Turniroj inter homoj kaj bestoj estas tre antaŭaj al la Romaj Ludoj. Tion montras la pentraĵoj kaj mozaikoj de la Minoa periodo (IV-a jarcento ant. K.). Platono rakontis la mistikajn buĉoferojn de taŭroj en la mita Atlantido.



Estas jam en la 3-a jarcento (ant. K.), ke oni komencis montri ekzotikajn bestojn al la publiko ; la unuaj estis 4 elefantoj kaptitaj dum la batalo kontraŭ Pyrrhus (275 ant. K.). En 251 estis 100 elefantoj kaptitaj dum la venko de Palermo kontraŭ la Kartaganoj. Ili partoprenis la grandan paradon de la militakiroj ; sklavoj, bastono ĉe mano, ilin kondukis kaj evoluciigis.

Kiam la Romanoj eniris en Afrikon la kuriozaj bestoj ne mankis.

En la I-a jarcento (ant. K.) oni vidis la unuan struton, kaj venis leopardoj, leonoj. La Numidaj Reĝoj, vasaloj de Romo, liveris multajn afrikajn bestojn.

Kelkfoje la bestoj (serpentoj, multkoloraj birdoj el Hindujo) estis nur montritaj al la popolamaso. Alifoje, ili eniris en la arenon por partopreni luktojn : leonoj kontraŭ elefantoj, tigroj kontraŭ taŭroj. Martial raportas pri la spektakloj prezentitaj de Domitien dum la inaŭguro de Kolizeo ; li admiris la sovaĝan kaj neatenditan eleanon de rinocero, ŝajne pacema, kiu subite forĵetas en aeron, kiel pilkon, enorman taŭron.

Baldaŭ viroj, la besto-mortigantoj, luktis kontraŭ tiuj sovaĝaj bestoj renovigante mitologiajn ritojn, kiuj donis al la spektaklo grandan dignecon.

S. GUILLOT.

Natalia Davydovna

Dum dekses jaroj, ŝi estis klasa kuratorino en la liceo por nobladevenaj knabinoj en la urbo « N » kaj ĝuis ekskluzivan, senprecedencan estimon flanke de la direktorino kaj de la tuta supera estraro. Oni respektis ŝian pedagogian rigorecon, la severan sindonemon al la laboro kaj multjaran sperton. Inter aliaj kuratorinoj, famiĝis onidiroj, ke ŝi ĝuas ĉe la direktorino la privilegion de intimaj raportoj post la vespertea tempo. Tial, oni ne amis ŝin kaj timis. La liceaninoj tremis antaŭ ŝi kaj ŝia klaso ĉiam estis plej modela en la bonkonduto kaj studsukcesoj. Tamen, tion ĉi ŝi atingis sen krioj, sen punoj, eĉ sen plendoj al la gepatroj de la knabinoj kaj al la estraro. En ŝia malvarma, nepalpebrumanta rigardo sentiĝis certoplena forto kaj en la trankvila tono de ŝia voĉo.

La vigla licea familio ne povis doni al ŝi, la sola el ĉiuj kuratorinoj, ian ajn vipofrapan, onidiran moknomon. Fininte la studkurson en tiu ĉi liceo, ŝi restis en ĝi en la posteno de kuratorino. Ŝi havis nek la infanecon, nek ion en la pasinteco, kiu estus simila al la plej

ĉasta licea romano, kvazaŭ ŝi aperis en la Dian mondon nur por esti kuratorino. Tamen, ŝi estis bela ! Ŝi havis delikattrajtan vizaĝon, flavbrunetan, superŝutitan per beletaj lentugoj. Tiaj vizaĝoj, iomgrade ftizotipaj, ĉiam plaĉas al viroj. Ĝian talion enviis la tuta liceo. Spite tion, neniu trovis en si la kuraĝon flirti kun ŝi. Al ĉiu ŝajnis ke li, eĉ per unu frivola intenco, povas ofendi tiun ĉi fraŭlinon, sin tute dediĉinta al la edukado de infanoj. Iu el la honoraj subtenantoj de la liceo nomis ŝin « senŝanĝa sentinelo ». Efektive, ŝi dediĉis al sia servado dudek horojn en diurno, kaj la restaj kvar horoj estis por dormo. Tamen, iufoje, vekiĝinte nokte, ŝi, per neaŭdeblaj paŝoj, vizitadis la dormoĉambrojn, kun ĉiam streĉe kuntirita korseto kaj en la uniforma robo plene butonumita. Eĉ ne unu bagatelajo el la griza vivo de ŝia « kokinejo » povis esti kaŝita al ŝi, kvazaŭ ŝi posedis la kapablon legi pensojn en ilia ĝermo.

Dum la tuta tempo de sia longa servado, Natalia Davydovna nur unufoje uzis longtempan forpermeson, ĝuste tiam, kiam, laŭ la konsiloj de kuracistoj, ŝi devis forveturi por kvar monatoj, por restarigi sian malfortiĝintan, pro la servado, sanstaton per marbanoj en la laguno de Odesa.

Krom tiu ĉi okazo, ŝi neniam forlasis murojn de la liceo. Nur neofte, ne pli ol unufoje en du aŭ tri monatoj, ŝi petis permeson pasigi la nokton de sabato al dimanĉo ĉe sia malsana onklino loĝanta ie en la ĉirkaŭaĵo de la urbo kaj suferante, jam de kelkaj jaroj, de la kruela virina malsano, ne permesanta al tiu ĉi estiminda virino forlasi la apogseĝon. Sed, pasiginte la dolorigan nokton ĉe la lito de la malsanulino suferanta de la terura sendormeco, kaj, samtempe, kaprica kaj incitiĝema, Natalia Davydovna venadis frumatene en liceon por ĝustatempe veni kune kun sia klaso al la meso. Post la meso, kiam la direktorino, kisinte la krucon la unua, stariĝis en la honora loko, apud la ĥorejo, kaj ĉiuj kuratorinoj revenante de la kruckisado reverencis al ŝi, ŝi, kapsigninte, alvokis Natalia Davydovna : « Do, kiel fartas via onklino ? ». « Nur Dio povas ŝin savi, grafino, ŝi ege suferas ! ».

« Kial, do, vi ne restis kun ŝi ? ». « Mi revenis por plenumi mian devon, grafino ». « Sed vi mem, infano mia, havas malsanan aspekton ! ». « Mia onklino ne dormis la tutan nokton ». « Bedaŭrinde, infano, vi pereigas vian sanon.

Iru tuj kaj ripozu, mia kara. Mi tuj ordonos, ke oni donu al vi bulionon kaj vinon ». La aspekto de Natalia Davydovna estis tute malsana dum tiuj dimanĉoj. Ŝajnis ke ŝi, nur antaŭnelonge, forlasis la liton post la turmentoplena malsano aŭ vekiĝis de la freneza orgio, tiom pala kaj laca estis ŝia vizaĝo kun la okuloj enkaviĝintaj kaj ombrumitaj, kun sekiĝintaj kaj morditaj lipoj.

Sed la afero konsistis el tio, ke nenian onklinon Natalia Davydovna havis. Kaj plej mirinde estis, ke neniu, eĉ ne unu fojon, dubis pri tio, dum dekses jaroj. Unufoje en du aŭ tri monatoj, sabate, post la vespera diservo, Natalia Davydovna modeste demandis la direktorinon : « ĉu vi permesos al mi, grafino, viziti mian onklinon ? ». « Nu, kompreneble, infano mia, nur ne tro laciĝu ! ». Kaj Natalia Davydovna, certiĝinte, laŭ kutime, ke ŝia « kokinejo » firme dormas, laciĝinte dum la tago de sia juneco, malrapide eliris el la licea pordego, preter la estimoplene kliniĝintaj gardistoj kaj pordisto. Deirinte sufiĉe malproksimen de la licea barego, ŝi elprenis el la poŝo densan nigran vualon, ŝirmis per ĝi sian vizaĝon kaj, subite, tuj tute aliiĝis.

Tiu ĉi estis jam prostituino, la serĉantino de aventuroj, kudristino el bona magazeno ; ĉio, kion oni volas, nur ne akurata kaj severa kuratorino. Ŝi iris per libera, malĉasta, iom voluptema irmaniero de la virino alkutimiĝinta aparteni al centoj da viroj. Per rigardo, ŝi sekvis la renkontitajn preterpasantojn, incitige ridis kiam oni ŝin tuŝis kaj, samtempe, atentema kaj singardema, ŝi vigle observis por ne trafi en la rigardon de tiuj, kiuj ŝin vidis antaŭe. Ŝia bela vizaĝo allogis virojn, sed al ĉiuj proponoj ŝi negative kapskuis, evitante plej persistemajn per aroga, iufoje cinika respondo, kaj fuĝante, foje de la ebriaj. La delonga sperto kaj senerara instinkto de la kaŝema malĉastemulino montris al ŝi, inter la centoj da ŝin volupte rigardantaj vizaĝoj, tiun, kiun ŝi bezonis. En rigardo, en la rava profilo de malantaŭa makzelo, en la karnivora rideto de blankaj kaj ne grandaj dentoj, en la irmaniero, tiu ĉi mesalino ekkonadis la trajtojn de pasia, nesatigebla virbesto kaj elektis lin. Al la bela aspekto, al la aĝo, al kostumo, ŝi restadis tute indiferenta. Iufoje la elektito estis maljunulo, iufoje — ĝibulon, iufoje — apenaŭ maturiĝinta liceano. La elektita de ŝi viktimo neniam forglitis de ŝi.

La hazarda tuŝo de ŝia kubuto, la hazarda rigardo, la tono per kiu ŝi eldiris banalajn stratvortojn devigis onin deziri ŝian proksimecon. Sendube, ekzistas iaj sekretaj, nevideblaj fadenoj, laŭ kiuj la pensoj de homo povas momente interligiĝi kun la pensoj de alia, apenaŭ nur ĵus renkontitan surstrate. Ŝi veturigis sian elektiton kien ajn, al la rando de la urbo, en la malpuran gastejon havantan plej malbonan reputacion kaj, la tutan nokton, sen ripozo, okupiĝis pri tiaj seksaj ĝuoj, kiujn povis inventi ŝia sekse senbrida imagpovo. Matene, kiam ŝia okaza kunulo lacigita per monstra orgio, falis en turmentigan dormon, ĉiuminute tremante, ŝi senbrue elglitis el la lito, sin vestis kaj, paginte ĉiujn noktajn elspezojn, per veturilo, rapidis al la liceo. Eĉ ne unu fojon, ŝi donis la duan rendevuon, kvankam ĉiuj, en la intervalo de du erektoj, petegis ŝin pri tio.

Unufoje, ŝia partnero estis soldato, ne juna, korpulenta homo, ŝajnis la staba skribisto. Frumatene, kiam komencis tagiĝi kaj la kurtenetoj ekvidebliĝis sur la blankiĝintaj fenestroj, li, incitita de ŝiaj karesoj, ĉirkaŭprenis ŝin, kuŝiginte la kapon sur ŝiajn mamojn kaj... subite, ekronkegis. Post kelkaj sekundoj, dum kiuj Natalia Davydovna maltrankvile demandis lin kio okazis, la skribisto komencis malvarmiĝi. Tiam ŝi konjektis kaj ekscitita pro la hororo, ekkriis per tia terura voĉo, ke la gasteja servistaro alkuris kaj rompis la pordon...

Post duonhoro, venis policanoj kaj juĝeja esploristo. La juĝeja esploristo, homo nejuna kaj saĝa, tuj rekonis Natalia — n, kiun li vidis ĉiuĵaŭde, en la akceptejo de la liceo, kien li venadis vidi sian filinon. Li deziris ĉesigi tiun ĉi okazintajon, sed lin mirigis ŝia senhontemo. Rekonsciiĝinte la hororon en kiun ŝin ĵetis la mortinto kaj ke ŝia pozicio en la liceo pereis, ŝi fariĝis cinike malkaŝema. Ŝi staris antaŭ la esploristo, nur surmetinte la jupon, ordigis siajn harojn, metis malantaŭ si la nudajn brakojn, neellasante el la buŝo harpinglojn kaj ŝi diris al li : « Vi miras kiamaniere, dum dekses jaroj, neniu havis eĉ etan suspekton ? Ĉu vi scias, ke iufoje, restante sola en mia ĉambro, mi sufokiĝis pro la rido, kiam mi rememoris pri tio !

Tio ĉi estis admirinda ! Esti rekonita preskaŭ sanktulino, kaj, dumnokte, malĉastegadi ! Ah, kial mi do diras tion al vi ? Vi, ja, la edziĝintaj viroj, ne malpli bone ol mi komprenas tiujn kaŝajn ĝuojn de seksa speco. Estas mirinde, ke al neniu venis en la kapon la penso, ke mi veturis Odeson tute ne por min bani en la laguno, sed simple, pro tio, ke mi estis graveda ». La esploristo rigardis ŝin kun scivolemo, kiu estis intermiksita kun timo. « Sed, ĉu vi eĉ ne unufoje renkontiĝis kun viaj gekonatoj ? » demandis li. Ŝi ekridegis. « Ne, mi feliĉe ne renkontis. Sed, tute egale, pri nenio mi riskis. Diru, jen, ĝuste vi, estimata homo kaj bona familiano... Ĉu mia propono ne devigus vin, almenaŭ pro ĝia originaleco, postkuri min ? Vi certe jam, de via filino, bone scias pri miaj korpaj belaĵoj, ĉu ? ». Kaj, metinte la kombilon en la harojn, sidiĝinte en la apogseĝon, ŝi trankvile aldonis : « Bonvolu voki la kurieron. Mi deziras lin sendi en la liceon, ke li prenu miajn aĵojn kaj dokumentojn. Cetere, bonvolu ordoni, ke oni alportu al mi matenmanĝon. »

Aleksandr KUPRIN

el la rusa lingvo tradukis Petro Poliŝĉuk

ION MINULESKU

Rumana simbolisma poeto.

Naskiĝinta 7.1.1881, mortinta 11.IV.1944 en Bukureŝto.

Liriko de muzikaj sonecoj, de arda sentimentismo, celebrinta per alegoria lingvaĵo, per melankolio kaj humuro, la maron, la amon, la ekzotikan miraĝon, la enigmajn animstaton (« Romancoj por pliposta epoko », 1908 ; « Interparolo kun mi mem », 1913 ; « Mi ne estas kio ŝajnas esti », 1936). Prozaĵoj, kun aŭtobiografiaj implicoj (« Reekzamenoto pri la rumana lingvo », 1929), satiraj (« Ruĝa, flava kaj blua », 1924) aŭ fantazisimbolaj (« La domo kun oranĝkoloraj fenestrokovriloj », 1908 ; « La sentimenta manekeno »). Nacipremiito (1928).

Laŭ « Mic dictionar enciclopedie » (Malgranda enciklopedia vortaro), Editura enciclopedică română, Bucuresti, 1972, p. 1424 kaj « Dictionar de literatură română (Vortaro de rumana literaturo), Editura Univers, Bucuresti, 1979, p. 259-260.



Ion Minulescu

ALVENAS, JEN, LA ŜIPOJ...

AL KRIKOR ZAMBAKĈJAN

Alvenas, jen, la ŝipoj,
Venu
Rigardi ilin al haven'
Kaj vidi, kiel — laciĝintaj pro la batal' kontraŭ
[la ŝtormoj —
Al fundo lasas pezajn ankrojn sinsekve fali, strangaj
[formoj,
Kvazaŭ mortintojn subakvigus per la knaranta ŝtala
[ĉen' !...

Alvenas kun ŝvelintaj veloj
Kvazaŭ virinaj sinoj, aro,
Kiujn pasia lipo signis per ardaj kisoj kun ador',
Kaj ŝajne venas saman fojon malnova, brila rememor'
De l' festoj por Neptun' —
Timiga reganto de Egea Maro.

Alvenas el la vast', misteraj,
Similaj al divenprofundo...
Ne scias ni de kiu mondo —
Eble de sud'
Eble de nord' —
Sed scias ni, ke ĉiun fojon alportas novon kaj
[abundon...

Alvenas, jen, la ŝipoj,
Venu
Demandi ilin pri l'alport' !...

HODIE MIHI, CRAS TIBI *

En mi kaj
En vi, en
Homkor'
Rido samtias,
Samtias la plor'...

Rido
Kaj ploro
Sub sama tegment' —
Rido eksonas kun nia naskiĝo
Kaj ploro — kun lasta moment'...
Kun pluva rideto
Ni fermas ĉambreton...
Kun venta plorego
Ni fermas tombegon
Per sama dolor',
En mi kaj
En vi, en
Homkor' !...

Esperantigitaj de Const. Dominte.

(*) Latinlingva dirajo signifinta « Hodiaŭ al mi, morgaŭ al vi ».

Bibliografio pri la tradukaĵoj el la verkoj de Minulescu en E-o :

1. HODIE MIHI, CRAS TIBI, trad. Eŭgenia Morariu, **La Espero** (Svedio), n-roj 7-8, 1966, p. 53.

2. AKVARELO AL CLAUDIA MILLIAN, trad. Julia 'Sigmond, **La Espero** (Svedio), n-roj 7-8, 1967, p. 53.

3. ALVENAS, JEN, LA ŜIPOJ, trad. C. Dominte, en la universitata lerno-libro : Prof. dr. I. Fl. Bociort, **Lucrâri practice de esperanto-interlingvistică,** Timisoara, 1979, 2-a eld., 1980 p. 160-161.

LA LOIRE EN LA 17a JARCENTO

La Fontaine (1621 — 1695) fama franca beletristo, ne nur specialiĝis en fabloj. Li skribis leterojn tiel poeziajn kaj spritajn kiel siaj fabloj. Dank'al unu el tiuj leteroj al edzino, ni povas scii kion li opinias pri nia valo de Loire (pr. Luar')... tiu de la 17a jarcento !

La Loir', do, estas rivero
Akvumanta landon de la ĉielo benita,
Laŭplaĉe kvieta, aŭ tiel sovaĝa,
Ke apenaŭ oni povas haltigi ĝian kuron [impetan :
Ĝi domaĝus mil fruktodonajn rikoltojn
Englutus vilaĝojn, flosigus urbojn,
Ĉion detruus en unu nokto :
Nur unu tago necesus
Por ke ĝi kuntrenu frukton
De tutjara laboro,
Se laŭlonge de ĝiaj bordoj ne estus dig-vojo
Kies prizorgado konstanta estas.
Tuj kiam parto cedas
Oni senprokraste ĝin restarigas.
Eĉ malgranda breĉo ne restas
Sen tujaj riparoj,
Kaj por tia konservado,
Sola rimedo al tiaj ruinegoj,
Ĉiu prenas sian parton :
Komunumoj, vilaĝoj kaj urbetoj.

Vi bone pensas, ke el ĝiaj bordoj,
Miaj kunuloj kaj mi ne mankis
Promenigi, ĉirkaŭe, nian vidon.
Tie, ni renkontis tiajn ĉarmajn lokojn
Ke animo mia ankoraŭ restas ekscitata :
Plaĉaj montetoj, ambaŭflankaj :
Montetoj ne tiel proksimaj al la ĉielo,
Kiel en Limoĝio, sed sorĉantaj montetoj,
Belaj domoj, agrablaj parkoj bele plantitaj.
Verdaj herbejoj multnombraj,
Vitejoj kaj arbaretoj, tiom da diversaĵoj,
Ke ŝajnis al mi esti en alia mondo.

Sed, la plej bela inter ĉiuj estas la Loire, [nedube.
Malofte, ĝi deiras de sia vojo,
Fluas torde kaj ondolinie
Kiel rivereto serpentuma tra herbejo :
Ĝi estas filino de Amfitrit'
Ĝi, kies merito,
Renomo, gloro, kaj bordoj
Estas indaj de tiuj provincoj
Ĉiamaj trezoroj de niaj princoj.
Ĝi disverŝas sian kristalon
Grandioze,
Kaj la ĝardenoj de Francio
Meritis tian kanalon.

Trad. B. CHEVERRY.

VIVOĜOJO

Tra l'genistoj kuri,
Ties guŝojn aŭdi
Sur via brak' klakefrapi
Kiel tintiloj fenditaj.

Kaj la birdojn vidi
Kun timo disflugi
El la bosko fulmrapidi,
Kvazaŭ knabinoj petolaj.

Vidi vekitan lacerton
Sub rubuson enŝteliĝi,
Kaj nigraverdan kolubron
Sian fleksan voston treni
Sur la erika ruĝkloŝet',
Ruĝa
Kiel tremanta sanggutet'
Sur senŝirma kruro via
De la ulekso pikita.


Kruron al rubus' impliki,
Kiel gapanto ekstumbli !
Sed senhalte
Tamen iri,
Kun, en uleks', la kalkanum',
Por la okul' ĉiela lum'.

Senti, ke ŝvit' de l' frunt' gutas
Kaj sur la dors' riveretas.
Kuri, kuri, ĝis senspiro,
Sen scii pri la celiro,
Sed senti sin viva, viva !
El la densej' aperante
Ĵeti laŭte, plenavoĉe,
Al la sep ventoj de l' ĉiel',
Huraojn sonorajn
Al la Junec',
Al la Pac' kaj Liberec' ;
Kanton
Viglan, vastan,
Al la ĝojo,
Kiun Dio dissemadas
En nia vivo !

Loeiz HERRIEU
El « Dasson ur galon »
(Korresonadoj)
Eldonis « Dihunamb » (Ni vekiĝu)
Traduko de Frédéric LE MAGADURE

POR VIA DISTRO

Krucvortoj :



(R) = nur radiko

Horizontale :

1 — Daŭre bezoni draton.
2 — Ĉevala koloro — blanka floro (R).
3 — Duondezerto (R).
4 — Povas utili al la unua.
5 — Bildo — Povas aperi en puso.
6 — Responda al des — Blankigas la harojn.
7 — Simbolo kemia — Esperiga sufikso — Pronomo poseda.
8 — Nomo de pluraj papoj.
9 — Imperiestro.
10 — Valora metalo — Fluas en Italio (R) — Negacio.

Vertikale :

1 — Prilaboras lanon.
2 — Eŭropa unuiĝo — Cifero — femalar.
3 — Senvaloraj produktaĵoj — Aro.
4 — Prepozicio — Naskigas forton.
5 — Animalaro — Plaĉas per la okuloj.
6 — Ero de arbo (R).
7 — Malkovro de la mondo (R) — Sonnivelo.
8 — Verkaĵon.
9 — Malpermesita renkonto — Sufikso.
10 — Speciala aĉetado.

HISTORIETOJ

Tedaĵo : Sinjoro X. moderne kondutas rilate sian filon. Tiam, kiam tiu ĉi deziras scii, kiamaniere la homoj pluigas la homaron, li tute ne hezitas por doni la necesajn klarigojn ;

La bubo paŭtas : « Nu, li rimarkas, ĉiufoje, kiam oni volas infanon oni devas rekomenci ? ! »

Ne ĉiufoje : Ni estas en ludvendejo. Mi volus, diras la kliento, 2 elektrajn trajnojn por miaj 11-jaraj ĝemeloj, 2 kudrilarojn por miaj 3-jaraj ĝemelinoj, 2 konstruo-ludilojn por miaj 7-jaraj ĝemeloj, 2 pupojn por miaj 5-jaraj ĝemelinoj, 2 miniaturajn aŭtomobilojn por niaj 3-jaraj ĝemeloj...

— Estas sensacia ! diras la vendisto, ĉiufoje vi havas ĝemelojn !

— Ne respondas la klientc, okazas ke mi havas nenion !

Laŭkutime : En Teksas ; elirante el trinkejo situanta en la ĉefa strato de malgranda vilaĝo, vakero subite tre alten eksaltas ... kaj brutale falas sur sia postaĵo.

— Kio okazas demandas preteriranto.
La vakero frotas siajn ripojn kaj kun minacanta voĉo krias :

— Ha ! se mi tenus la stultulon, kiu alilokeu kondukis mian ĉevalon !

Kompatema : Du vojaĝantoj sidas en subtrajno ;

— Sed, kial vi havas viajn manojn antaŭ viaj okuloj ? unu demandas la alian.

— Ĉar mi ne povas elteni vidadon de virino staranta antaŭ mi, respondas tiu ĉi.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

◆◆◆◆

IĜ

IĜ ESPRIMAS PER SI MEM ŜANĜON DE STATO

Kun adjektiva radiko :

sekiĝi, grandiĝi, puriĝi.

Kun adverba, prepozicia aŭ afiksa (prefiksa, sufiksa) radiko :

(oftiĝi -supriĝi) (kuniĝi -aliĝi) disiĝi-etiĝi).

Kun substantiva radiko :

— edziĝi-krepuskiĝi- amasiĝi-paciĝi,

— albordiĝi- enlitiĝi- senfoliiĝi- mallumiĝi ;

— endormiĝi- elreviĝi- senvestiĝi deflankiĝi- elvagoniĝi.

Ne lasi sin enfali en malesperon :



Trankviliĝu mia karulo ! Mi tute ne enuas ; mi havas bonajn amikojn. Hieraŭ, via advokato kondukis min al la diskoteko, kie ni dancis preskaŭ ĝis tagiĝo. Kaj mi havas por morgaŭ inviton de la juĝisto por la Surpriza Festo de la juristoj.

Artaj donitaĵoj :



Se vi povus longigi tiun pentraĵon je 20 centimetroj, forigi tiun hororan rozkoloron kaj egaligi tiujn timigajn ondojn, ĝi iĝus agrabla ornamaĵo por nia nova salono.

Grandtalentulo :



Jen la skizo de nia nova urbodomo. Dank'al tiu ĉefverko, nia tre amata konfitisto, S-ro Duril, iĝis la unuapremiulo.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichs trasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivis töntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - 5 (650 pes.).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (8000 liroj).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoons traat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (22 guld.).
Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.
Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (12 us. dol.).
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).
Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 3 de 1981, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le compte rendu de l'Assemblée générale nous apporte des détails sur le compte d'exploitation de 1980. Si nous examinons le compte « séjours », nous constatons que l'excédent de recettes va en s'amenuisant d'année en année, malgré un nombre maintenant à peu près constant de stagiaires. Cela tient à la fois à l'augmentation très importante des produits, à la progression des salaires et à la qualité du service qui exige un personnel plus nombreux. L'augmentation régulière de nos tarifs n'a pas suffi pour faire face. Il nous faudra nous pencher sur le problème si nous voulons poursuivre notre programme d'investissements. Il est vrai que celui-ci a toujours été financé plus ou moins par les excédents de recettes annexes, les nouvelles parts souscrites, les dons et, pour les travaux ou les achats qu'il est impossible d'étaler dans le temps, par l'emprunt auprès des amis. On peut aussi envisager dans ce cas un emprunt auprès d'un organisme.

La saison d'été s'annonce assez bonne seulement. Les inscriptions sont arrivées très tôt cette année et nous avons dû, dès la fin du mois de mars, en refuser quelques-unes. Mais, en faisant le calcul des inscrits, nous nous apercevont que les demandes de réservations de chambres particulières ont été nombreuses, et nous avons dû attribuer des chambres à deux lits à des personnes seules. Les chambres sont toutes occupées, mais des lits restent libres. Un autre phénomène est que les séjours incomplets, peut-être plus nombreux cette année, laissent des chambres libres pendant quelques jours, parfois une semaine ; vide difficile à combler. Il reste encore quelques places pour la deuxième et la troisième période. Le nombre de campeurs est relativement restreint. Peut-être l'installation réelle du printemps pourra-t-elle en décider quelques-uns ?

Vous avez pu constater que l'adresse du Libro-Servo est devenue simplement « Maison Culturelle Espérantiste ». En effet, M. Ciret nous a demandé de le libérer de ce travail. Le Conseil d'administration l'a remercié de la tâche indispensable qu'il a remplie jusqu'à ces dernières semaines avec efficacité, ainsi que des responsabilités de gestions qu'il a assuré avec Mme Ciret à une époque difficile de la vie de la Maison Culturelle. Un nouveau responsable prendra ce service en mains en octobre.

P. BABIN.

INTER NI

Dum la ĝenerala Asembleo de la 17-a de Majo la kasisto donis klarigojn pri la financa bilanco de la jaro 1980. Li konstatis, ke la profito de la funkciado-konto malaltiĝas iom post iom jam de kvar jaroj, kvankam la nombro de vizitantoj preskaŭ stabiliĝis. La kialoj estas la tre forta altiĝo de la prezo de la aĉetitajoj kaj de la salajroj kaj ankaŭ la plibonigo de la servoj, kiu postulis pli da servistinoj. La regula plialtiĝo de la tarifo ne sukcesis kompensi la pliajn elspezojn. Ni devos studi la problemon se ni deziras plu investi. Fakte en la antaŭaj jaroj investado estis ebla pli malpli dank'al la profito de la libro-servo, novaj akcioj aĉetitaj, mondonacoj kaj, por la tre kostaj riparoj, modernigoj aŭ materialoj per prunto fare de geamikoj.

La somera sezono anonciĝas sufiĉe bona sed ne tiom, kiom ni unuavide esperis. Tre rapide malliberiĝis preskaŭ ĉiuj ĉambroj por la unua periodo sed aperas, ke ĉambro dulita estas multkaze okupita de unu sola persono. La ĉambroj estas ĉiuj rezervitaj sed restos « senhomaj » litoj. Alia fenomeno estas, ke nekompletaj restadoj, eble pli multaj ĉijare, lasas kelkajn ĉambrojn ne okupitaj dum kelkaj tagoj, « truoj » ne facile ŝtopeblaj. Ni esperas, ke la printempo finfine instaliĝos kaj kuraĝigos la tendumantojn.

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE du Dimanche 17 Mai 1981

L'assemblée générale ordinaire des sociétaires de la Maison Culturelle Espérantiste s'est réunie le dimanche 17 mai 1981. Le nombre des présents et représentés était de 221 pour un capital de 51.900 F. Le quorum étant atteint, la séance est ouverte à 10 heures.

M. F. Boyet est élu président de séance.

Rapport financier

Le compte d'exploitation et le bilan de l'exercice de l'année 1980 sont présentés par le trésorier, Dominique Babin. Cette année encore, les dépenses ont augmenté beaucoup plus que les recettes. Il ressort, en particulier une diminution très importante de l'excédent du compte « séjour » qui est, cette année, pratiquement nul, alors qu'il était de l'ordre de 20 % en 1977.

A cette situation, s'ajoute le fait que *Kulturaj Kajeroj* est en fort déficit. La revue, en effet, était jusqu'ici autonome ; les seules pages vertes, qui constituent une publicité pour la Maison Culturelle, étaient financées par celle-ci. Cette année, la Maison a dû combler le déficit de la revue elle-même. Cette situation, due probablement à l'irrégularité de sa parution et à la forte augmentation des lecteurs qui ne renouvellent pas leur abonnement ,est préoccupante.

A l'occasion de ce rapport financier, l'Assemblée générale souhaite qu'un budget publicité pour la Maison Culturelle, ainsi que pour la revue soient prévus chaque année.

Le compte d'exploitation et le bilan de l'exercice sont approuvés à l'unanimité par l'Assemblée général, après quitus des commissaires aux comptes.

Résolutions capital social

L'Assemblée générale enregistre le remboursement de 13 parts de sociétaires pour un capital de 1.300 F. Elle enregistre également l'arrivée de vingt nouveaux sociétaires pour 135 parts.

30 parts nouvelles ont été souscrites par des sociétaires.

Le capital social s'élève désormais à 124.200 F. pour 497 sociétaires.

Ces résolutions sont adoptées à l'unanimité par l'Assemblée générale.

Résolutions diverses

M. Prévot est renouvelé par l'Assemblée générale dans ses fonctions de commissaire aux comptes. Mlle Ergoll a demandé d'être relevée de ses fonctions de commissaire aux comptes. M. Cortes est proposé par l'Assemblée générale pour la remplacer. Mais sa nomination est conditionnée à son acceptation. Le Conseil d'administration est chargé de trouver un deuxième commissaire aux comptes dans le cas d'un refus de M. Cortes.

Rapport d'activités

Le président, M. Pierre Babin, rappelle que ce rapport a été communiqué à tous les sociétaires. Le succès des activités de la Maison Culturelle a été identique à celui des années précédentes. Ce succès s'est traduit en particulier par les travaux de réfection du couloir du deuxième étage et de

la chambre 29 (avec création d'une petite chambre bre supplémentaire). Il reste que les participants suivent assez peu les programmes proposés, puisque seulement 20 % d'entre eux ont assisté à un stage complet (du premier au dernier jour).

Questions diverses

— M. Ciret demande à être déchargé de sa fonction de responsable du Libro Servo et de son poste de membre du Conseil d'administration. L'Assemblée générale regrette de voir partir l'un des membres les plus anciens du Conseil d'administration, et tient à lui exprimer toute sa reconnaissance pour le travail accompli.

— M. Pierre Babin, président, demande à l'Assemblée générale que le Conseil d'administration puisse étudier la possibilité de faire un emprunt dans une banque pour faire face, éventuellement, à une grosse facture. L'Assemblée générale donne une réponse favorable à cette demande à l'unanimité.

— Le problème de la revalorisation de la propriété est posé. La valeur de celle-ci est, en effet, actuellement basée sur le capital social qui reste déterminé par des parts de sociétaires à 100 F. Une longue discussion s'engage, d'où il ressort que l'Assemblée générale envisage une répartition de parts supplémentaires qui permettra d'augmenter le capital social. Les modalités de cette répartition seront précisées par le Conseil d'administration.

L'ordre du jour étant épuisé, l'Assemblée générale est close à 12 h. 30.

Le secrétaire de séance :
J.-P. GUILLOT.

CONSEIL D'ADMINISTRATION du Dimanche 17 Mai 1981

Sont présents : MM. et Mmes D. Babin, P. Babin, J. Benistant, F. Boyet, B. Cheverry, G. Dairon, J.-P. Guillot, E.-L. Mathé, P. Métivier, Prévot, Vincent.

M. Ciret est excusé, et donne sa démission du Conseil d'administration. Il sera remplacé provisoirement par Mme Vincent pour la responsabilité du Libro Servo.

Stages d'été

Les demandes d'inscriptions sont nombreuses, mais le nombre des participants reste moyen en raison d'un très faible nombre de campeurs.

— La première période se déroulera sous la responsabilité de M. et Mme Babin. Les cours seront assurés par M. Durwael pour l'un et par M. Babin pour l'autre. De nombreuses conférences sont déjà prévues.

— La deuxième période se déroulera sous la responsabilité de Guy Dairon et Pascale Babin. Les cours seront assurés par Mme Childs-Mee pour le premier cours, par M. Lloancy pour le deuxième et par M. F. Boyet pour le troisième. M. Ribot sera à la disposition des stagiaires pour divers compléments.

— La troisième période sera dirigée par M. et Mme Mathé. Cette période sera marquée, pour une partie, par un séminaire de pédagogie de méthode directe dirigé par Mme Childs-Mee. Les cours seront assurés par M. Mee pour le 1er degré, par M. Parizot pour le 2e degré et par Mme Vincent pour le 3e degré.

Passages

Plusieurs passages auront lieu au cours du printemps et pendant le mois de septembre.

Questions diverses

— Une discussion s'engage à propos de *Kulturaj Kajeroj* : Cette revue a-t-elle un rôle à jouer dans le monde espérantiste ? Peut-on améliorer sa situation en faisant une publicité plus active ?

Une enquête sera faite auprès des lecteurs dans un prochain numéro afin de savoir si elle continue à intéresser les espérantistes et s'il convient de la maintenir.

Dans le cas d'une réponse affirmative suffisamment nette, un concours sera ouvert pour modifier la page de couverture.

— Une demande a été faite pour organiser à Grézillon des stages de clercs de notaires (deux ou trois fois par an). Un complément d'information sera demandé auprès des organisateurs.

— S.A.T.-Amikaro demande d'organiser son congrès national à Grésillon en avril 1982. Des pourparlers sont en cours, mais le Conseil d'administration rappelle que la semaine des enfants reste prioritaire.

— L'an prochain, Grésillon fêtera ses 30 ans. Un album-photo sera étudié au cours des stages de l'année 1981.

Le secrétaire de séance :
J.-P. GUILLOT.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	1,00
couleur	:	1,20
Cuillères de collection	:	25,00
Pendentifs	:	20,00
Porte-clés	:	20,00
Coupe-papier	:	35,00
Thermomètres voitures	:	35,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	4,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

Commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 80 Fr.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 50,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE

CATALOGUE

...aujourd'hui

PAŜOJ AL PLENA POSEDO

(4e édition)

de **William AULD**